

icon2024 : International Conference on Constructed Languages 2024

4 & 5 julio 2024 Orléans (Francio)

La Internacia Simpozio pri la Konstruitaj Lingvoj (I-CONlangs II, 2024) estas la dua eldono de evento (unuafoje okazinta en Torino en 2022) kiu celas proponi forumon dediĉitan al plurdisciplina esploro de la konstruitaj lingvoj.

La temo de la konstruitaj lingvoj nutras ideojn kaj inventojn sur lingva kampo, kaj pridemandas pri la homa kapablo proponi novajn formojn por lingva esprimo laŭ diversaj celoj. Ĉi tiu fenomeno estas interesa ne nur por lingvistiko, sed ankaŭ por aliaj fakoj de la homaj sciencoj, samkiel por la literaturo kaj la artoj, kaj tiu intereso eĉ transiras la akademian rondon.

Fakte, unu el la plej fruktodona tereno de invento estis unue la internaciaj helplingvoj, ekde la 19a jarcento. Inter la publikigitaj lingvoprojektoj, Esperanto devas ricevi specialan atenton, ĉar tiu lingvo ebligis la aperon de komunumo de parolantoj (inkluzive de denaskuloj) dum longa periodo, komunumo kiu ebligis la aperon kaj evoluon de aparta kulturo kaj sociologio, kaj de propra historio kaj literaturo. Do estas por ni grave ricevi komunikaĵojn pri Esperanto, kiel lingvo kaj kiel socia kaj historia fenomeno – sed kompreneble ankaŭ eblas proponi komunikaĵojn pri aliaj internaciaj helplingvoj kiuj havis interesan rolon en la frua historio de interlingvistiko (ekzemple Volapük, Ido, Occidental, Interlingua...), aŭ dum pli malfrua periodo, aŭ eĉ ligitaj al aliaj tipoj de konstruitaj lingvoj.

Aliflanke, konstruitaj lingvoj ankaŭ ludas pli kaj pli gravan rolon en la kultura medio per la fikciaj lingvoj uzataj en artoj kaj literaturo. Dank'al la povo de la imago, homoj inventas lingvojn por la fikciaj mondoj kaj konstruas verŝajnan fikcian ekosistemon laŭ la propra interna diegezo. Oni trovas tiujn fikciajn lingvojn en literaturo, kino, arto, televido, kaj videoludoj, kie ili estas uzataj por alporti realecon kaj vivon al futurismaj, ekzotaj, aŭ fantaziaj civilizacioj. La simpozio alvokas al prelegoj pri fikciaj lingvoj, sen limigo pri la konsiderata lingvo aŭ la elektita aliro (kontrastiva, sociologia, geografia, artistika, ktp). Ni invitas ne nur esploristojn por pritrakti la temon, sed ankaŭ lingvokonstruistojn kiuj dezirus dividi siajn spertojn kaj siajn lingvojn.

Fine, interesa tereno por detala esploro pri lingvaj fenomenoj estas tiuj lingvoj, kiuj estis kreitaj pli lastatempe por pedagogiaj, logikaj, aŭ esploraj celoj. Ekde la epoko de la rekonstruitaj protolingvoj por testi la filogenetikajn hipotezojn de la 19-a jarcento, ekzistas lingvoj kiuj ne celas efektivan uzadon, sed celas virtuale testi lingvistikajn hipotezojn : la hipotezon de Sapir-Whorf (ekz-e Loglan), la eblecojn de lingva kontakto (ekz-e Brithenig), aŭ por elprovi la limojn de polisemio (ekz-e Toki Pona). Kelkaj el tiuj lingvoj havas duoblan celon, pro kio ili povas esti konsiderataj kiel eksperimentaj kaj artaj lingvoj (ekz-e Láadan) aŭ kiel eksperimentaj kaj helplingvoj (ekz-e Sona). Finfine, estas ankaŭ taŭge demandi pri eksperimentaj aplikoj de aliaj konstruitaj aŭ naturaj lingvoj (ekz-e la propedeŭtika aspekto de Esperanto).

La kreado de konstruita lingvo povas havi diversajn celojn, sed ilia studo aperigas komunan serion da demandoj, kiujn I-CONLANG II 2024 intencas pritrakti.

Jen listo de kelkaj ekzemploj el tiaj esplorindaj demandoj:

- La diversaj celoj de la konstruitaj lingvoj kaj la rimedoj uzitaj por atingi ilin;
- La lingvaj rimedoj uzitaj en la kadro de konstruitaj lingvoj;
- La specifaj malhelpoj kiuj aperas dum la kreado kaj/aŭ uzado de konstruita lingvo;
- La sociaj kaj kulturaj efikoj kaj konsekvencoj de la konstruitaj lingvoj;
- La disvolviĝo de lingvoprojektoj kaj ties rezultoj (simbolaj, psikologiaj, sociologiaj, kaj historiaj) ;
- La defioj kaj limigoj de tiaj lingvoj;
- La diferencoj aŭ similecoj observitaj inter la konstruitaj lingvoj kaj la naturaj lingvoj.

Por plej bone speguli la diversecon de la konstruitaj lingvoj, la simpozio estos organizata tra tri preleg-sesioj (laŭ la triangulo de Gnoli) :

- Sesio pri **help-lingvoj**, precipe pri Esperanto;
- Sesio pri **fikciaj lingvoj** (en literaturo, kinarto, videoludoj, ktp.);
- Sesio pri konstruitaj lingvoj kun **pedagogiaj, logikaj aŭ eksperimentaj celoj**.

Ankaŭ estos organizita aldona **afiŝ-sesio** por prezenti la kreadon de novaj konstruitaj lingvoj, kaj ni invitas ĉiujn lingvo-konstruistojn fari ĉi-rilate proponojn, sen konsideri ĉu ili estas studentoj, instruistoj, esploristoj, aŭ personoj laborantaj ekster la akademia medio.

Praktikaj informoj

Ret-kontakto: icon2024@sciencesconf.fr

Retejo de la simpozio: <https://icon2024.sciencesconf.org/>

Retpaĝo por deponi komunik-proponojn: <https://icon2024.sciencesconf.org/user/submissions>

Limdato por proponoj: 15an de februaro 2024

Formato de la proponoj (parola kaj/aŭ aŝiŝa): 1 paĝo maksimume (inkl. bibliografio)

Daŭro de parola komunikaĵo: 20 minutoj (+ 10 mn por diskutado)

Dato kaj loko de la simpozio: Orléans, Francio, 4-5 Julio 2024

Lingvoj de la simpozio : franca, angla.

Scienca komitato

Michael ADAMS (Indiana University), Paolo ALBANI (verkisto), Davide ASTORI (Università di Parma), Bettina BEINHOFF (Anglia Ruskin University), Simone BETTEGA (Università di Torino), Elisa CORINO (Università di Torino), Natalia DANKOVA (Université du Québec en Outaouais), Pascal DUBOURG-GLATIGNY (CNRS, EHESS), Guillaume ENGUEHARD (Université d'Orléans), Sabine FIEDLER (Universität Leipzig), Christopher GLEDHILL (Université de Paris), Federico GOBBO (Universiteit van Amsterdam), Grant GOODALL (University of California, San Diego), Édouard KLOCZKO (tradukisto), Ilona KOUTNY (Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu), Frédéric LANDRAGIN (CNRS, ENS), Chiara MELUZZI (Università di Milano), Roberto MERLO (Università di Torino), Sébastien MORET (Université de Lausanne), David J. PETERSON (lingvo-konstruisto), Philippe PLANCHON (Université de Tours), Alice RAY (Université d'Orléans), Marine VERRIEST (Université de Namur), Marina YAGUELLO (Université Paris VII).

Bibliografiaj indikoj

- Adams Michael (ed.), *From Elvish to Klingon: Exploring Invented Languages*, Oxford University Press, 2011.
- Albani Paolo et Buonarroti Berlinghiero, *Dictionnaire des langues imaginaires*, Paris: Les Belles Lettres, 2010.
- Auroux Sylvain, « Les langues universelles », in S. Auroux (dir), *Histoire des idées linguistiques*, Tome 3, Bruxelles / Liège : Pierre Mardaga Editeur, 2000, pp. 377-396.
- Barandovská-Frank Věra, « De nouveaux défis pour l'interlinguistique », *Cahiers de l'ILSL*, 61, 2019, p. 9-26.
- Barnes Lawrie et Van Heerden Chantelle, « Virtual Languages in Science fiction and fantasy literature », *Language Matters: Studies in the Languages of Africa*, 37:1, 2006, p. 102-117.
- Blanke Detlev, « How not to reinvent the wheel... The essential scholarly literature in interlinguistics and esperantology », *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 2015, p. 200-215.
- Bobon Jean, « les pseudo-glossolalies ludiques et magiques : (Trois Langues Artificielles, d'origine Ludique, Chez Une Paraphrénique Hypomaniaque) », *Langages*, 91, 1988, p. 61-74
- Burney Pierre, *Les langues internationales*, Paris : Presses Universitaires de France, 1966.
- Comrie Bernard, « Natural and Artificial International Languages: A Typologist's Assessment », *Journal of Universal Language*, 1(1), 1996, p. 35-55.
- Decloquement Valentin, « Traduire l'atticisme : comment adapter en français une langue artificielle? », in *La traduction épistémique : entre poésie et prose*, Paris : Presses universitaires du Septentrion, 2020, pp. 143-164.
- Duličenko Aleksandr D., et Moret Sébastien, « Le marxisme et les projets de langue universelle du communisme », *Cahiers du Centre de Linguistique et des Sciences du Langage*, 14, 2003, 101-120.
- Eco Umberto, *La recherche de la langue parfaite dans la culture européenne*, Paris : Seuil, 1994.
- Fiedler Sabine, « English as a lingua franca – a native-culture-free code ? Language of communication vs language of identification », *Apples - Journal of Applied Language Studies*, 5(3), 2011, p. 79-97.
- Fiedler Sabine, « Planned languages and languages created for fantasy and science-fiction literature or films: A study on some points of contact », *Język Komunikacja Informacja / Language Communication Information*, 14, 2019, p. 139-154.
- Fiedler Sabine et Brosch Cyril R., *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*, Amsterdam / Philadelphia : John Benjamins Publishing Company, 2022.

- Gobbo Federico, « Alan Turing creator of Artificial Languages » *InKoj*,3(2), p. 181-194, 2012.
- Gobbo Federico, « Tolkien and language planning: imagined words for an imaginary world », in *Creating Worlds through Languages*, Athenaeum Edizioni Universitarie, pp. 91-106, 2019.
- Gobbo Federico, « Coolification and Language Vitality: The Case of Esperanto » *Languages*,6(2), 93, 2021.
- Jeandillou Jean-François, « Métadiscours et enseignement d'une langue artificielle », *LINX*, 36.1, 1997, 157-166
- Koutny Iлона, « A typological description of Esperanto as a natural language », *Język Komunikacja Informacja / Language Communication Information*, 10, 2015, p. 43-62.
- Libert Alan Reed, *Mixed artificial languages*. München : Lincom Europa, 2003.
- Marlaud Sarah, « Les langues artificielles sont-elles des langues ? Étude contrastive de l'espéranto et de la caractéristique universelle », *Syntaxe & Sémantique*, 14.1, 2013, p. 85-117.
- Martinet André, « La Linguistique et les Langues Artificielles », *Word : Journal of the International Linguistic Association*, 2:1, 1946, p.37-47
- Meyer Anna-Maria, « Slavic constructed languages in the internet age », *Language Problems and Language Planning*, 40(3), 2016, p. 287-315.
- Moret Sébastien, « Autour des Langues dans l'Europe nouvelle Une réception de Meillet par les adeptes des langues artificielles », *Histoire Epistémologie Langage*, 41.2, 2019, p. 157-176.
- Moret Sébastien, « D'un Vice Caché Vers Une Nouvelle Conception de La Langue: Les Langues Artificielles et La Linguistique », *Cahiers Ferdinand de Saussure*, 57, 2004, p. 7-21
- Okrent Arika, *In the Land of Invented Languages*, New York : Spiegel & Grau Trade Paperbacks, 2010.
- Pereltsvaig Asya, « Esperanto Linguistics: State of the Art », *Language Problems and Language Planning*, 41(2), 2017, p. 168-191.
- Peterson David J., *The Art of Language Invention: From Horse-Lords to Dark Elves, the Words Behind World-Building*. London : Penguin books, 2015.
- Piron Claude, *Le défi des langues – Du gâchis au bon sens*. Paris : L'Harmattan, 1994.
- Porset Charles, « Notes sur les langues artificielles au XIXe siècle », *Romantisme*, 9.25, 1979, 179-189.
- Punske Jeffrey *et al.* (eds), *Language Invention in Linguistics Pedagogy*, Oxford University Press, 2020.
- Racault Jean-Michel, « La question des langues dans L'Utopie de Thomas More », *Travaux & documents*, 2005, 23.
- Rosenfelder Mark, *The Language Construction Kit*, Chicago : Yonagu Books, 2010.
- Sériot Patrick, « Colloque: "Les Langues Artificielles" (Veysonnaz, 17-18 Juin 2002) », *Cahiers Ferdinand de Saussure*, 57, 2004, p. 3-6
- Slaughter Mary M., *Universal languages and scientific taxonomy in the seventeenth century*, Cambridge University Press, 1982.
- Sokolovska Zorana, « Politique des langues : le débat sur l'espéranto au Conseil de l'Europe », *Nouveaux cahiers d'allemand*, vol. 35, n° 4, 2017, p. 369-380.
- Stria Ida, *Towards a linguistic worldview for artificial languages*. Thèse de doctorat, Université Adam-Mickiewicz de Poznań, Ed. Wydział Neofilologii UAM w Poznaniu, 2015.
- Tonkin Humphrey, « Language planning and planned languages: How can planned languages inform language planning? » *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13:2, 2015, p. 193-199.
- Van Oostendorp Marc, « Constructed Language and Linguistic Theory », in K. Schubert (ed), *Planned Languages: from concept to reality*, Bruxelles : Vlekho, 2001, pp. 203-222.
- Yaguello Marina, *Les Langues imaginaires. Mythes, utopies, fantasmes, chimères et fictions linguistiques*, Paris : Seuil, 2006.